

JURA
TRIBUNO
INTERNACIA



N-ro 18

Jaro 2019

Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Eldonas: INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Poŝta Adreso: José María Rodríguez Hernández
JURA TRIBUNO INTERNACIA
Apartado de Correos 3142
E-14080 CÓRDOBA (Hispanio)

Elektronika Adreso: jurista@esperanto.ac

Direktoro: José María Rodríguez Hernández

Kunlaboris ĉi-numere: D-ino Rafaela Urueña Álvarez
Advokato Miguel Faria de Bastos

La revuon ricevas ĉiuj membroj de IJEA. Por aliĝi al nia asocio informoj aperas sur la paĝo 7-a

Depósito Legal: CO-844/97
Edita: Asociación Andaluza de Esperanto
Apartado de Correos 611
14080 Córdoba
Imprime: Litopress SL

ENHAVO

	Paĝo
Prezento	5
Raporto pri la kunsido de IJEA dum la Universala Kongreso. Lisbono 2019	11
Vivo de la Asocio	17
Eŭropa Unio kaj Klimatŝanĝo	23
Ĝenerala Skizo pri la Kafalo kaj ĝia akcepto en la Okcidentaj Juraj Sistemoj	41
Mallongaj Juraj Informoj	47
Galerio de Elstaraj Juraj Esprantistoj	52
Jura Vortaro: <i>Verdikto</i>	53
El nia Gazetoteko: <i>La Jurpunaj Ideoj de Aristotelo</i>	56
Juro kaj Kino: “ <i>Dek du koleremaj homoj</i> ”	67

PREZENTO



Karaj IJEA-kunasocioj:

Nome de la estraro kaj ankaŭ propranome, mi deziras kaj esperas revidi vin en Lahtio kaj bonvenigi vin en la tiea asemblea kunsido de nia Asocio.

Vi estas invitata prezenti tiam ideojn kaj projektojn por la antaŭeniro de nia Asocio, volontuliĝi por prelegi en venonta kunsido, partopreni la varbad-kampanjon kaj verki jurajn artikolojn por publikigo en nia bonnivela revuo *Jura Tribuno Internacia*, kies direktoro estas nia senlaca kunestrarano José María Rodríguez Hernández.

Daŭras ja la varbad-kampanjo por plinombriĝo de nia Asocio, cele al ties kreskado laŭ nombro kaj kvalito de novaj membroj, kiel eble el ĉiuj landoj, cele al pliiĝo de ties reprezentanteco kaj videbligo antaŭ la juraj medioj tra la mondo kaj al la interrilatado kun ne-esperantistaj juraj internaciaj asocioj. Orient-azianoj, ekzemple, tute mankas en nia Asocio.

Mi strategie fokusigas ĉi-faze brazilanojn, hispan-parolantojn kaj ĉinojn, ĉar ili entute konsistigas pli ol duono el la juristoj de nia planedo. Ĉi-afere tamen, ne malpligrava estas la celo de la estraro havi ene de nia Asocio almenaŭ unu membron po Lando.

Se vi konas juriston aŭ jurustinon membreblan, el iu lando el la mondo, kiu eble ŝatus, emus aŭ scivolus aliĝi al IJEA, bv. kunlabori kun la estraro varbante lin/ŝin, kiel novan mebron de IJEA. Memoru, ke membro-studento kaj membro-staĝanto pagas nenion kiel aniĝ-kotizon, nek kiel membro-kotizon, sed li/ŝi povas esti tre utila por nia Asocio estontece aŭ eĉ nun aŭ baldaŭe.

Nia asocio havos sian propran tablon okaze de la Monda Foiro dum la Universala Kongreso, sabate la 20-an de julio, inter 19:00 kaj 21:00 horoj. Vizitu nin tie kaj, se eble, kundeĵoru aŭ kunlaboru tiam kun ni, eĉ se nur dum kelke da minutoj. La numero 18-a de nia revuo estos tiam disdonata al la asocioj vizitantaj nin.

Elkore salutas vin.

Miguel Faria de Bastos
Prezidanto de Internacia Jurista Esperanto-Asocio



ALIĜU AL INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO

Kiu rajtas esti membro de I.J.E.A.?

- Ordinara membro: devas esti profesia juristo aŭ posedi universitatan aŭ ekvivalentan diplomon pri Juro.
- Membro-studento: devas studi por licenciĝo pri Juro.
- Membro-staĝanto: devas staĝi en jura profesio.
- Membro-korespondanto: devas utile kunlaboradi kun la Asocio, ĉu esperanto, ĉu alilingve, jen spontane, jen laŭ invito de la Asocio.

Kiel aliĝilo plenumu la sekvantan paĝon kaj sendu ĝin en jurista@esperanto.ac

Kotizoj.

La jara kotizo kostas 7 eŭrojn se vi loĝas en iama socialisma lando de Orienta Eŭropo, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko aŭ Latin-Ameriko. Se vi loĝas en alia lando la kotizo estas 14 eŭrojn. Membro-studentoj aŭ membro-staĝantoj pagas neniom.

Eblas pagi al UEA-konto ejax-r (pri pagmanieroj vidu en la *Jarlibro* de UEA. Ankaŭ oni povas aboni la jaran kotizon rekte okaze de la Ĝenerala Asembleo kiu ĉiu-jare okazas kadre de la Universala Kongreso de Esperanto.

Se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. skribi pri tio al nia adreso: **jurista@esperanto.ac**



ANIĜILO/MEMBRIĜO

Antaŭnomo:
Familia nomo (majuskle):
Profesio:
Poŝtadreso:
Retpoŝto:
Urbo:
Lando:
Nacieco:
Kategorio de estonta asociano:

- ordinara asociano
- jurstudento
- staĝanto
- korespondanto

Foto

Mi ĉi-pere kandidatiĝas al la statuso de membro de IJEA obeonte ties statuton |
kaj pagonte la ĉi-suban jarkotizon.

Jarkotizo: -- se ordinara membro de neesceptaj landoj:

14 Eŭroj

-- se ordinara membro de iamaj socialismaj orienteŭropaj

landoj, Azio (ekscpte de Israelo, Japanio kaj Koreio),

Afriko kaj Latinameriko:

7 Eŭroj

Subskribo de la kandidato: X

Pagmanieiro: Eblas ĝiri al **UEA-konto ~~ejax-r~~** aŭ pagi al surloka estranaro de IJEA la
sumon de jarkotizoj ŝulditaj al Internacia Jurista Esperanto-Asocio (IJEA).

Subskribo de IJEA –estranaro kiel ricevpruvilo de ĉi-aniĝilo:

X

Tago: Monato: Jaro: ...

Ĉi-Kunas (fotokopie): identigilo kun foto

Ĉi aniĝilo estu sendata al la jena retadreso (kasisto): jurista@esperanto.ac

Retadreso de la Prezidanto: mfb@debastosadvogados.com

Decido pri ĉi-tiu kandidateco per subskribo de IJEA-estranaro:

X

~~Sekretario – Kasisto Retadreso: jurista@esperanto.ac~~
~~Prezidanta retadreso: mfb@debastosadvogados.com~~

Kunlaboru kun *JURA TRIBUNO INTERNACIA*

Se Vi emas verki en esperanto pri juraj temoj ni plezure aperigos Viajn kontribuaĵojn en niaj paĝoj. Vi nur devas atenti pri la jenaj kondiĉoj:

ARTIKOLOJ: rilataj al iu jura branĉo. Do: krimpuna, ekonomia, imposta, civila, internacia, historia, filozofia, administracia, ktp. Pri la longeco, pli malpli 4/10 foliojn A4 (unuflanka duobl-spaca). Se eble aldonu kelklinian resumon pri la artikolo.

RECENZOJ: Vi povas recenzi verkon. La libro elektota devas temi pri Juro, kvankam ne necese pri/en esperanto. La libro povas esti redaktata en kiu ajn lingvo, tamen la recenzon oni devas verki en esperanto.

INFORMOJ: Vi povas informi pere de ĉi tiuj paĝoj pri juĝoj, novaj leĝoj, internaciaj aferoj, traktatoj, ktp, aŭ pri io rilata al la Juro en Via lando aŭ komunumo. La informoj devas ampleksi 1/3 foliojn.

TRAKTATOJ: se Vi tradukis kelkan internacian traktaton, aŭ scias kie aperas la Esperanto-traduko de kelka internacia kunveno, informu al ni pri tio.

Ne dubu kunlabori kun la jura revuo. La proksima numero aperos dum la monato julio 2020, do, prefere se oni ricevas la materialon antaŭ la fino de la monato majo 2020.

La redakciaj adresoj estas:

✉ *Jura Tribuno Internacia*. Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

📧 jurista@esperanto.ac



Sciencia Fakultato en la Universitato de Lahtio (Finnlando)



Enirejo al la Urbodomo de Lahti

Raporto pri la kunsido de Internacia Jurista Esperanto-Asocio dum la Universala Kongreso Lisbono 2018

Okaze de la Eksterordinara Asemblea Kunsido de I.J.E.A., Internacia Jurista Esperanto-Asocio, okazanta en Lisbono kadre de la Universala Kongreso de Esperanto, kunsidis 14 asocioj subskribintaj la liston de ĉeestantoj.

Unue la Prezidanto, S-ro Miguel Faria de Bastos, salutis la ĉeestantojn. Poste, li sciigis pri la retmesaĝoj kaj de la Sekretariino, antaŭa Prezidantino, Prof-ino Rafaela Urueña, kaj de la Direktoro kaj Redakciestro de la revuo *Jura Tribuno Internacia*, S-ro José María Rodríguez Hernández, rilate al ilia malĉeesto pro malsanaj problemoj de edzo kaj gepatroj respektive.

Li poste informis pri la partopreno de nia asocio en la hieraŭa tago, ĉe aljuĝata tablo de la Movada Foiro, kie kelke da materialo estis ekspoziciita por legado aŭ forprenado kaj interŝanĝo de impresoj kaj ideoj ankaŭ okazis.

Sekve, li legis la tagordon de la asemblea kunsido kun la jena enhavo:

1. Legado de la asemblea protokolo de Nitra.
2. Raporto de la Estraro:
 - Retejo por IJEA.

- Varbakampanjo por membriĝo en IJEA.
 - Planita E-kurso en Universitato en Luando.
 - Planita prelego kun sekva kolokvo en la Portugala Ambassadejo en Luando (Angolo) sub la temo “La estonta lingva ordo internacia laŭ homaraj interesoj”.
3. Kontoj de la Asocia Estraro (jaroj 2016 kaj 2017).
 4. Konsistigo de listo au listoj de kandidatoj por la estraraj organoj por la venonta jar-trio. Balotado por ties elekto.
 5. Programo por la venonta jaro.
 6. Proponoj kaj demandoj.

Sekve la Prezidanto invitis iun ajn el la ĉeestantaj asocioj deĵori ĉe la asemblea tablo kiel redaktanto de la protokolo, tamen neniu volontulis tiucele, do la Prezidanto elektis S-ron Manuel Cristóvão, ĵus aliĝinta kiel asocio-studento, fakte studento dum la fina jaro en la Fakultato pri Juro en la Metodista Universitato en Luando, Angolo.

Antaŭ la tagordo, asocianto atentigis pri la fakto, ke en la programo de la Kongresa Libro aperas eraro konsistanta el duobligo de la sesio rezervita por la asemblea kunsido de IJEA, unu informanta pri la hodiaŭa tago, dimanĉe la 29-an inter la 16-a kaj la 18-a horo, en la salono Nguyen, kaj alia sciigas por la 2-a de aŭgusto, en la salono Macedo, inter la 11-a kaj la 12 ¼ horo. Ĉi tiu duobligo estas videbla kaj en la kronologia laŭtaga programo, kaj en la tabela laŭtaga programo. Oni decidis, unualoke, ke la hodiaŭa sesio estu tiu laŭ-leĝa, sed ĉiukaze

IJEAnoj profitu la sekvan sesion por sciigo al la forestantoj pri la rezulto de ĉi tiu kunsido kaj por disdono de la ĉi-jara numero de la revuo, jam sendita de la redaktisto, tamen ne ankoraŭ alveninta a la profesia oficejo de la prezidanto.

1. La unua tagordero temis pri la legado de la asemblea protokolo de Nitra (2016), pro tio ke en Seulo (2017) ne okazis formala kunsido, sed nur neormala kunsido, pri kiu asociano S-ro Fortuna skribis retmesaĝe ala prezidanto, kiel dirite ne ĉeestanta tiun kunsidon.

2. La dua tagordero temis pri agado de la estraro. La prezidanto informis pri la ne-kompletigo de la retejo de IJEA kaj li klarigis, ke tio okazis pro manko de fina kunordigado de la informoj, ĝentile senditaj tiucele, ĉefe de Profesoro Ivo Osibov kaj de S-ino Birthe Lapenna, vivdino de Prof. Ivo Lapenna.

La prezidanto ankaŭ informis pri la nuna ne rapida antaŭeniro de la planita varbkampanjo, ekigita kaj plurvoje lanĉita de li mem, li juĝis nepra por sukcesa realigado de tiu varbkampanjo la tiucelan kunlaboradon de ne malmultaj asocianoj kaj E-juristoj.

Ene de la sama tagordo, la prezidanto memorigis ke, simile al pluraj aliaj E-kursoj kaj E-prelegoj, laŭlonge jam faritaj de li en universitatoj kaj kulturaj asocioj dum antaŭaj jaroj en Luando (Angolo), li planas ĉi-foje la organizon de E-kurso por juristoj kaj studentoj pri Juro, okazonta en la Fakultato pri Juro de la Universitato “Lusíadas” en Luando. La kurso havos du fazojn, la unua kun baza kurso kaj la dua pri jura terminologio. Malgraŭ

tio, ke la projekto estis tuj, eĉ entuziasme, per-buĝe akceptita de la ĉefa administranto kaj de la jura fakultatestro de tiu Universitato, dokumento kun aproba respondo ne venis sufiĉe ĝustatempe kun dato konvena por la studkalendaro de la Fakultato, ne por la laboro de la IJEA-prezidanto, deĵoranta kiel LKK-ano por Instituciaj Rilatoj en la organizado de la 102-a Universala Kongreso de Esperanto en Lisbono.

Tiel, por iamaniere kompensi la ne-okazigon de la planita E-kurso por juristoj kaj studentoj pri Juro, kiu devus okazis en la Fakultato pri Juro, la Prezidanto de IJEA okazigis ĉe sia advokata oficejo en Luando E-kurseton, ankaŭ kun elementa fazo kaj sekve pri jur-terminologia fazo. Ĉi tiu kurso daŭriĝis kvin monatoj, komence ĉeestis 12 homoj, inter advokatoj, staĝ-advokatoj kaj studentoj de la finaj kursoj.

Al tiu lernanto kiu plej sukcese profitis la kurson oni aljuĝis premion, kiu konsistis el pago de la aliĝo al Universala Kongreso, ir-revena flugbileto, hotela loĝado, partopreno en UK-ekskursoj (al Koimbro kaj Nordo de Portugalio), ĉeesto en la bankedo kaj tiurilataj aranĝoj kaj bezonoj. La gajninto estis la angola jur-studento Manuel Cristóvão, kiu ĉeestis la UK-on en Lisbono kaj ankaŭ ĉi asemblean kunsidon de IJEA.

En la sama tagordo, oni informis pri la prelego en la Portugala Ambassadejo en Luando, kiu estis akceptita de la “Instituto Camões”, tamen ne venis respondo de la portugala ataŝeino pri kulturo, reprezentanto en Angolo de tiu Instituto.

3. Pri la tria tagordero, kontoj de la estraro de la jaroj 2016 kaj 2017, oni aprobis la dokumenton pri enspezoj kaj elspezoj redaktiva de la Sekretariino Profino Rafaela Urueña. Laŭ tiu dokumento la kredita saldo valida je 31/03/2018 estas 219,48 €, surbaze de la konteltiro de la IJEA-konto ĉe UEA. Tamen, la asembleo petis al la prezidanto prezenti la eltiron mem, sur kiu baziĝis ĉi tiu dokumento redaktita de Prof-ino Urueña kaj klopodi klarigi la valoron de la jarkotizo de normala ordinara asocio kaj, se eble, la nomojn de tiuj pagis la kotizon, por pli bona kontrolo fare de ĉi tiuj pri tio ĉu la pago estas aŭ ne jam plenumita de ili. La prezidanto promesis tion fari ĝis la venonta asemblea kunsido.

4. Pri la kvara tagordero, balotado por la asociaj organoj dum la venonta jaro, la prezidanto sciigis, ke Prof-ino Rafaela Urueña informis al li retmesaĝe, ke ŝi ne ree volas partopreni la estraron de IJEA. La prezidanto mem manifestis sian volon lasi sian postenon de prezidanto kaj do, ne rekandidatiĝi nun al tiu posteno kaj tial, li provis tiam persvadi unu kaj alian el la ĉeestantoj kandidatiĝi al tiu posteno. Fine neniu prezentiĝis kaj oni petis al la prezidanto rekandidatiĝi al tiu posteno. La prezidanto, antaŭ ĉi tiu situacio, konsentis esti denove kandidato.

Ankaŭ ne estis kandidatoj por almenaŭ du aliaj postenoj de la estraro. Oni petis al la prezidanto, post lia elekto, koopti dua aliajn estraranojn, surbaze de analoga interpeto de la artikolo 11.1 de la statuto de la asocio. Oni akceptis ĉi tiun proponon kun unu voĉdono kontraŭa. La nuna prezidanto S-ro Miguel Faria de

Bastos estas unuanime reelektita de la ĉeestantoj al la sama posteno, kun la rekomendo, ke li kooptu du pliajn estraranojn, unu por la posteno de Sekretario kaj alia por senfaka posteno.

La prezidanto sciigis la ĉeestantojn, ke li deziras inviti S-ron José María Rodríguez Hernández, nuna direktoro de la revuo *Jura Tribuno Internacia*, por la posteno de Sekretario-Kasisto kaj S-ron Fortuna, ne ĉeestanta en ĉi tiu kunsido, sed ja en la Universala Kongreso, por senfaka posteno kiel estrarano.

5. Pri la kvina tagordero, programo por la venonta jaro, la prezidanto informis, ke la ĉefa tasko, lia kaj de liaj kunestraranoj, estos daŭre antaŭenigi la varbadkampanjon kun helpo de kiel eble plej multe de asocioj kaj E-juristoj. Li sciigis ankaŭ, tiuriale, pri la peto de S-ro José María Rodríguez, direktoro de *Jura Tribuno Internacia*, adresita al ĉiuj interesitoj kontribui per bonkvalitaj kaj interesaj artikoloj por la enhava konsistigo de la revuo, kiu estas ŝajne la ĉefa atuto de IJEA, kadre de ties strategio pri kreskado kaj videbliĝo ekster IJEA kaj interrilato kun samcelaj asocioj.

6. Neniu starigis proponon aŭ demandon

Sen pliaj aferoj, la asemblea kundo finiĝis je la 10-a h, ties protokole estonte subskribita de prezidanto kaj de la porokaza asemblea adjunkto, S-ro Manuel Cristóvão.

Vivo de la Asocio

§ De la 2-a ĝis la 5-a de majo 2019 okazis en la urbo Malago, sude de Hispanio, samtempe la 21-a Andaluzia Kongreso kaj la 78-a Hispana Kongreso de Esperanto. La ĉefa temo de la renkontiĝo estis pridiskuti la lingvan situacion en Eŭropa Unio, speciale nun, kiam verŝajne Britio forlasos ĉi tiun eŭropan komunumon.

Pro la samtempa okazigo de la Internacia Fervojistaj E-Kongreso, la partopreno de geesperantistoj vere estis amasa, tiel preskaŭ ducento el gesamideanoj ĉeestis la belan mediteranean urbon Malago.

Internacia Jurista Esperanto-Asocio ankaŭ kunlaboris en la organizado de la prelegoj, kaj tiel oni invitis elstarajn samideanojn, fakuloj pri lingvoj kaj pri juro, prelegi pri la jenaj temoj:

- Profesoro Federico Gobbo, de la Universitato de Amsterdamo (Nederlando), parolis pri la onta rolo de la angla lingvo en Eŭropo. Li samtempe ekigis historian vojaĝon de la unuaj pruvoj krei eŭropajn komunajn instituciojn ĝis la nuntempa Eŭropa Unio. Li montris al ĉiuj, ke ĉi tiu vojo estis konstanta

idea lukto inter la norda protestanta Eŭropo, preta kunlabori en la unuigo de Eŭropo sen forgesi la ne-tuŝeblan suverenecon de la eŭropaj ŝtatoj kaj la suda katolika Eŭropo, pli proksima al la ideo

fondi federalan unuigitan Eŭropon, eĉ pli potenca se eble ol la sendependaj kaj suverenaj eŭropaj landoj. Rilate la ontan rolon de la angla lingvo en la Eŭropa Unio, li sciigis sian opinion, tiel kvankam multaj homoj opinias, ke la angla lingvo iomete perdis sian influon post la ebla *briteliro*, verŝajne, male, tio povus eĉ plifortigi la rolon de la angla lingvo en Eŭropo, pro la fakto, ke temas pri lingvo kiu apartenus reale al neniu eŭropa ŝtato, nur ĝi estus oficiala, aŭ kun-oficiala, en du eŭrop-uniaj ŝtatoj: Malto kaj Irlando. Do, povus eĉ okazi, ke en la onta Eŭropa Unio la angla lingvo estus kiel neŭtrala kiel esperanto, ĉar ĝi apartenus al neniu eŭrop-unia ŝtato.



D-ro Federico GOBBO parolas pri la lingva situacio en Eŭropa Unio.

- D-ro Sean O’Riain, irlanda diplomatiisto en Vieno, prelegis pri la rolo de la tiel nomataj: minoritataj lingvoj en Eŭropo. Oni ne devas forgesi, ke kvankam du aŭ tri lingvoj ja

estas la kerno de la oficiala komunikado de la Eŭropa Unio, vere ekzistas 24 oficialaj lingvoj, inter ili kelkaj ja minoritataj kiel la irlanda aŭ la malta, kun apenaŭ centmiloj da parolantoj. D-ro O’Riain montris sin kiel fakulon pri la irlanda lingvo, li eĉ estis respondeculo de la irland-lingva versio de la TTT-paĝo de la Eŭropa Komisiono.



D-ro Sean O’Riain prelegis pri la rolo de la minoritataj lingvoj en la Eŭropa Unio.

- Katalin Kovats, de la Universitato de Budapeŝto, prelegis pri la lingvoj instruataj en Eŭropo. Ŝi eĉ parolis pri sia propra familia sperto kaj kiel lastatempe tiuj lingvoj pli amase instruataj en eŭropaj landoj ŝanĝiĝis pro politikaj kaj ekonomiaj cirkonstancoj.



D-ino Katalin Kovats
prelegis en Malago
(Hispanio)
Majo 2019

- Dámaso Suárez Iglesias, prezidanto de la Hispana Asocio por la Defendo de la Lingvo, parolis hispan-lingve kun samtempa tradukado en esperanton, pri la movado ekzistanta en kelkaj eŭropaj ŝtatoj, ĉefe Francio kaj ankaŭ nun en Hispanio, kiu celas defendi naciajn lingvojn kontraŭ la deviga uzo de la angla lingvo en eŭropaj landoj, ĉefe en universitataj niveloj. Laŭ li, ĉi tiu situacio provokis, ke en kelkaj eŭropaj ŝtatoj oni ne uzas iliajn naciajn lingvojn en la universitata instruado kaj la angla lingvo ludas tiun rolon gravegan por la vivo de la lingvo mem.

- José María Rodríguez Hernández, sekretario de la Internacia Jurista Esperanto-Asocio, parolis pri la lingva reĝimo en Eŭropa Unio kaj kiel al la unuaj 4 oficialaj lingvoj oni aldonis, post ĉiu nova aliĝo de eŭropaj ŝtatoj, pliajn lingvojn ĝis entute la nun 24 oficialaj lingvoj. Li ankaŭ menciis, la malfacilan sed ne

maleblan eniradon pere de la Eŭropa Parlamento, de Esperanto en la Eŭropan Union.

- Fine, ĉiuj prelegantoj, escepte S-ro Suárez, partoprenis en ronda tablo pri la temo de la kongreso. “Lingva Situacio en la Eŭropa Unio”. Partoprenis en ĉi tiu diskuto ne nur la prelegantoj, sed ankaŭ la nombraj ĉeestantoj kiuj sciigis siajn opiniojn kaj personajn spertojn tiurilate.

Verdire temis pri tre enhavo-riĉa programero de la Hispana kaj Andaluzia Kongreso de Esperanto, kiu pritraktis tre aktualan temon en la vivo de Eŭropa Unio, tio estas la lingva situacio post la ebla *briteliro*. Se tiu brita eliro finfine okazas sendube estos grava ŝanco por diskonigi nian internacian lingvon en la eŭropaj institucioj.

§ Ni memorigas al ĉiuj membroj de nia asocio, kaj ĝenerale al ĉiuj juristoj esperanto-parolantaj, la ekzisto de interreta kurso pri Internacia Juro de la Maro, produktita de Internacia Jurista Esperanto-Asocio pasint-jare. Tra peskaŭ 2 horoj kaj en 10 lecionoj, oni trakuras la bazajn elementojn de la Internacia Juro de la Maro. Je la fino de ĉiu leciono troviĝas demandaro, pere de kiu oni povas taksi la akiritajn konojn.

La kurso estas libere alirebla ĉe la jutuba kanalo de nia asocio, do serĉu en jutubo: “Internacia Jurista Esperanto-Asocio”.

Duan interretan kurson preparas nia asocio kaj esprele ĝi estos alirebla antaŭ la fino de la kuranta jaro, la temo estas “Studo pri la morto-puno en la nuntempa leĝaro”. Temos pri studado de diversaj leĝaroj kie ankoraŭ ekzistas ĉi tiu kruela kondmano.

§ Memoru, ke ekde nun la elektronika adreso de nia asocio estas: **jurista@esperanto.ac** Ĉi tiu ligilo estis afable havigita al ni de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Do, bv. forstreki el viaj kontaktoj la jam ne plu-validan ~~esperanto-juro@ono.com~~

Ĉu via profesio rilatas al Juro?

Ĉu vi ŝatas jurajn temojn?

Kial ne aparteni al Internacia Jurista Esperanto-Asocio ?

Sciu pri aliĝ-kondiĉoj, legu paĝon 7-an.

Eŭropa Unio kaj Klimat-ŝanĝo

 **D-ino María Rafaela Urueña Álvarez**

Profesoro pri Internacia Juro kaj Internaciaj Rilatoj. Valladolid (Hispanio)

Dum la lastaj jardekoj la situacio de la medio suferis gravajn damaĝojn. La mondo estas minacata de la industria funkciado, de la amasa konstruado de loĝejoj, ne ĉiam en la plej taŭgaj lokoj, de nocaj gasoj, de plastikajoj, de nigraj tajdoj ktp, kiuj kaŭzas malekvilibran evoluon kaj neelteneblajn situaciojn.

Ĉio ĉi kaŭzas fenomenojn kiel damaĝon al la ozontavolo, senarbarigon, klimatsanĝon, akumuladon de rubaĵoj, perdon de biodiverseco kiuj fine povas trafi la homan vivon kaj eĉ la pacon.

Unesko aprobis la Programon “Homo kaj Biosfero” (*Man and Biosphere*) en 1971, tiam oni uzis la terminon *biosfero* por nomumi la tutan medion. La biosfero estas tiu parto de la tero en kiu koncentriĝas kaj evoluas la vivo. Temas pri fajna tavolo kiu ĉirkaŭas la teron, konsistanta el la malaltaj partoj de la atmosfero, la oceanoj, la surfaco de la tero, do tie kie vivo eblas. En la oceanoj, la vivo okazas tie kien eniras lumo, kiu permesas vivi la fitoplanktonon kaj zooplanktonon kaj eĉ en la marfundoj estas vivestaĵoj. Do, oni substrekas la devon konservi la interrilaton *homo-medio*, kiu devas esti ekvilibra por la postvivado de la

homaro. Pri tiuj gravaj temoj agadas ĉefe Unuiĝintaj Nacioj kaj Eŭropa Unio.



Programo *Homo kaj Biosfero*, lanĉita de UNESKO
en la jaro 1971

Inter la multaj gravaj temoj kiujn Unuiĝintaj Nacioj (UN) traktis por protekti la medion, ni elstarigos la defendon de la **tutmonda klimato**. Post la Konferenco de Stokholmo pri la Homa Medio, de 1972, dudek jarojn poste, en 1992, U.N. alvokis al *Konferenco pri Medio kaj Evoluo*, ĉifoje en Rio-de-Ĵanejro (Brazilo), kiu estis vera pintkunsido pri la medio. La konferenco estis grava, kun partopreno de 176 ŝtatoj, 1.200 internaciaj organizoj, multaj neregistaraj organizoj kaj 2.500 ekologiistaj grupoj, do, temis pri la plej multnombra konferenco ĝis nun konata pri la zorgado de la medio.

Inter la Deklaracioj kaj dokumentoj, estis du devigaj traktatoj: *Konvencio pri la Klimatŝanĝo kaj Konvencio pri la Biodiverseco*.

La Konvencio pri la klimatsanĝo subskribita en Novjorko 1992, estas iom nepreciza, kaj restis kiel bazo por

venontaj traktatoj. Tamen ĝi enhavas gravajn difinojn. Al tiu sekvis diversaj protokoloj kiel tiuj de Kioto, Montrealo, kaj pluraj konferencoj kiel tiuj okazintaj en Balio en 2007, en Kopenhago en decembro 2009, kaj la kunsidoj en Durban kaj Koçabambo, ktp.

La tutmonda klimatsanĝo estas difinita en la Traktato, kiel *“klimatsanĝo kaŭzata rekte aŭ nerekte de la homa agado kiu difektigas la tutmondan atmosferon kaj kiu adiciiĝas al la naturaj sanĝoj de la klimato, observitaj dum kompareblaj tempoperiodoj”*. Aliflanke, la klimato estas konsiderata *komuna heredaĵo de la Homaro*.

En tiu konvencio oni volis batali kontraŭ la t.n. tutmonda klimatsanĝo, forceja efiko, kaj la acida pluvo.

Tamen tiu konscio komenciĝis malfrue, nur post gravaj poluciaj akcidentoj okazintaj sur la tero, en la riveroj, en la aero kaj en la maroj. La aktuala klimatsanĝo, laŭ la plej granda parto el la sciencistoj, ne okazas pro diversaj naturaj fenomenoj kiel en la pratempo, sed pro ni mem kaj nia vivmaniero. La sciencistoj konstatis ke ekde la komenco de la 20-a jarcento, kaj ĉefe post la 70-a jardeko, la temperaturo de nia planedo pliiĝis 1° C averaĝe, sed en kelkaj sudaj partoj de la tero, tiu pliiĝo estas pli alta ol tiu cifero.

Certe ni opinias, ke 1° C laŭlonge de kelkaj jaroj ne estas troe, tamen por nia biosfero tio signifas multe. Pro tio, studante la klimaton kaj la vivon sur la tero, la pliiĝo je unu centigrado estas tute grava fenomeno, nekonata en Eŭropo dum la lastaj 5.000

jaroj. Pro tio *la celo nun estas ne atingi la nivelon je 2° C en la jaro 2050. Superi tiun ciferon kaŭzos terurajn fenomenojn kiel la mankon de akvo kaj nutraĵoj, ekstremajn meteologiajn fenomenojn kaj gravan damaĝon de unikaj ekosistemoj.*



La homa agado estas la ĉefa kaŭzo
de la nuntempa klimatsanĝo

Unu el la plej gravaj konsekvencoj de tiu klimatsanĝo estas *la varmigado de la terglobo*, la t.n. *forceja efiko*. *Forcejoj* estas tiuj kovritaj ejoj, per plastikaĵoj aŭ vitraĵoj, kie oni produktas diversajn fruktojn kaj legomojn. Do, simile okazas en la klimato de nia terglobo, kiu post la homaj aktivaĵoj kaj poluado ne nur influas en la flaŭro, faŭno, naturaj estaĵoj, la oceanoj, sed eĉ en la sano de la personoj, per tre diversaj malsanoj, ĉar la tera atmosfero estas komparebla al la vitroj de giganta forcejo.

La sciencaj opinioj, kiel tiu esprimita de la Interregistara Komitato de UN pri Klimatsanĝo kaj specife subtenata de la naciaj sciencaj akademioj de la G8-ŝtatoj, estas ke “la averaĝa

tutmonda temperaturo kaj la varmigo observata dum la lastaj 60 jaroj estas atribuebla al la homa agado. Tiujn ŝanĝojn nuntempe oni konstatas pro la jenaj situacioj: *La glaĉeroj retroiras kaj leviĝas la marnivelo de la oceanoj.*

La montaraj glaĉeroj, tiuj imponaj glacia lango kiuj staras en la ĉefaj montaroj de la planedo, estas speciale senseblaj al la klimatsanĝoj, pro tio la glaĉeroj kaj la polusoj estas konsiderataj kiel gravegaj montriloj de tiu tergloba varmigo. Nur en Eŭropo, la Alpoj perdis dum la lasta jarcento proksimume trionon de sia glacioj. La Kilimanĝaro en Afriko degelas same ol Groenlando kaj la frostigitaj teroj de la Siberia tundro, Kanado kaj Groenlando, kiuj enhavas muskon kaj likenojn post la lasta glacia epoko, post degelo diseriĝas en metano, gaso kies forcejefiko estas tre forta, kaj kaŭzas la rompon de naftoduktoj kaj vojoj en Siberio kaj Alasko.

La duan konsekvencon oni sentas en la maroj.

La sciencistoj asertas ke ekde 1960, laŭ la informoj ricevitaj de la satelitoj, la marnivelo leviĝas pli ol 2 milimetroj jare proksimume, kaj ili atribuas tiun fakton al la klimatsanĝo, kiu degeligas la glaĉerojn kaj la polusojn. Sekve, tiu ekstra volumo da akvo iras al la maro kaj aliflanke la varma temperaturo ekspansias la oceanojn. Tiu leviĝo de la marnivelo havos dramajn rezultojn en kelkaj zonoj de nia planedo.

Fine, en la maro, oni perdos marajn speciojn, plimultigos la fitoplanktonon, kaj la temperaturo de la maro fariĝos pli alta.

Krome, kiel jam dirite, *ni havos klimatologiajn ekstremajn fenomenojn*. Unu el la konsekvencoj de la tutmonda klimatsanĝo estas la plia ofteco de ekstremaj atmosferaj ŝanĝoj kaj katastrofoj rilataj al la klimato. Varmbatoj, huraganoj, inundoj pro pluvego ktp. ne nur en la zonoj kie kutime okazas tiuj fenomenoj, sed en aliaj kie neniam ĝis la lastaj jarcentoj okazis, ekzemple, en Eŭropo.



Oni ekvidas jam la katastrofajn konsekvencojn de la klimatsanĝo.

Se al tio ni aldonas la t.n. “*verdajn konfliktojn*”, kaŭzataj pro la damaĝoj al la medio, ni konstatas jam multnombrajn elmigradojn pro manko de akvo, de kultiveblaj grundoj, ekstrema sekeco ktp. Tiuj fenomenoj estas tiel gravaj ke eĉ la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj konstatis grandan oftecon de militoj pro tiuj kialoj. Ĉar la poluado de la medio kaj la manko de akvo kreas naciajn kaj internaciajn konfliktojn. Jam en la jaro 1987, la Informo *Brundtland* asertis ke “*la media streĉiteco estas samtempe kaŭzo kaj efekto de la politikaj kaj militaj konfliktoj*”

Eblas ke tiuj konfliktoj pligraviĝos kiam malabundos tiuj rimedoj”.

Poste, la Ruĝa Kruco kaj la Ruĝa Krescento certigis ke, *“la sperto de multaj konfliktoj montras ke la damaĝoj kaŭzataj al la akvosistemoj pro la militoj havas dramajn sekvojn por la civila loĝantaro kaj iliaj vivrimedoj”.* Do, la rilato inter malabundo de naturaj rimedoj, armitaj konfliktoj kaj media detruo estas unu el la radikoj de la modernaj militoj, do, de la “verdaj konfliktoj”.

Kompreneble, la jaroj pasis kaj Unuiĝintaj Nacioj planis novan traktaton pri la klimato.

Pro tio, la membroj de U.N. lanĉis, je la fino de 2011, en Durbano, la ideon intertraktadi novan tekston pri la Klimato kaj ili fiksas la daton: 2015.

Nova traktato pri la klimato: Parizo 2015

En la Konferenco de Parizo pri la klimato, okazinta en decembro 2015, 175 partioj subskribis la unuan devigan tutmondan traktaton pri tiu temo. Tiu ĉi grava traktato nomata *“Kadra konvencio de Unuiĝintaj Nacioj pri la klimatsanĝo”* starigas mezurojn por redukti la elsendojn de forcejefikaj gasoj, cele al mildigo de la efektoj kaŭzantaj la varmigadon de la terĝlobo. Ĝia aplikado efektiviĝos en la jaro 2020, kiam finiĝas la valideco de la Protokolo de Kioto. Tiu interkonsento estis intertraktita dum la 2-a konferenco pri klimatsanĝo ĉe UN de la

195 membroŝtatoj, adoptita la 12-an de decembro 2015 kaj malfermita por subskribo la 22-an de aprilo 2016, ĝuste por festi la “Tagon de la Tero”.

La 5-an de oktobro, post ratifo de Eŭropa Unio, la Traktato de Parizo ekvalidiĝis la 4-an de novembro 2016.

La celoj de la traktato estas tre klaraj, “plifortigi la tutmondan reagon al la klimatsanĝa minaco, laŭ la kunteksto de daŭripova evoluigo kaj de la klopodoj por elradikigi la malriĉecon, kaj por tio, oni fiksas tri konkretajn agadojn:

- a) Teni la altigon de la monda temperatura ĉiam sub 2° C rilate la preindustriajn nivelojn kaj strebi limigi tiun altigon je 1,5°C.
- b) Adaptiĝi al adversaj efektoj de la klimatsanĝo kaj stimuli evoluon de malaltaj elsendoj de forcejefikaj gasoj.
- c) Pliigi la financadon kondukantan al favora evoluo de la klimato (artikolo 2).



UN-Konferenco pri Klimatsanĝo. Parizo 2015

Por tiuj celoj, antaŭ kaj dum la konferenco, la ŝtatoj prezentis siajn naciajn agadplanojn kontraŭ la klimatsanĝo, kaj bedaŭrinde, oni konstatis ke tiuj planoj ne sufiĉos por teni la tutmondan varmigon sub 2°C.

Tamen, la registaroj konsentis kunsidi ĉiun 5 jarojn por fiksi celojn, laŭ sciencaj principoj kaj informi pri ilia agado al la ceteraj registaroj kaj civitanaro, same kiel taksi la progresojn je longdaŭra limtempo.

Sed kompreneble, por ĝia efektivigo, ne nur la ŝtatoj, sed ankaŭ la lokaj kaj regionaj administracioj devas agadi tiucelen.

Rolo de Eŭropa Unio (EU)

La rolo de EU en la sfero de la mediprotektado estis kaj estas ege grava. EU, kiel dirite, ratifis la Traktaton de Parizo la 5-an de oktobro 2016, kaj tiel la Traktato ekvalidiĝis, post havi la subskribon de 96 ŝtatoj plus Eŭropa Unio.

Vere EU troviĝas avangarde rilate al la internaciaj klopodoj plenumi tutmondan interkonsenton pri la klimato. Post sia limigita partopreno en la Protokolo de Kioto kaj post la malkonsento en la pintkunsido de 2009 en Kopenhago, EU rolis grave per malfermo de publika debato por koaliciigi evoluintajn landojn ĝis atingi la bonajn rezultojn de la Konferenco de Parizo.

S-ino Connie Hedegaard, eksa eŭropa respondeculo pri Klimata Agado deklaris jene: *En Kopenhago la mondaj gvidantoj fiksas la celon teni la varmigadon de la terĝlobo sub 2° C por eviti*

la gravajn konsekvencojn de la klimatsanĝo. Ili pravis. Sed ni konstatas ĉiutage, ke la mondo malproksimiĝas de tiu celo, do oni bezonas fari ion pli, ĉefe plian kunlaboron inter ĉiuj. La nuna dokumento proponas fiksi pozicion de Eŭropa Unio kaj kontribui al sukceso de traktato, en 2015.

Antaŭ la Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri la Klimatsanĝo, la Konsilio pri Medio de EU starigis la poziciojn survoje al tiu Konferenco, planantaj ambician interkonsenton jure deviga, por teni la varmigon de la planedo sub 2° C. Tiucele, EU prezentis sian kontribuon al la sekretariejo de la Traktatkadro de UN pri Klimatsanĝo, aldonante la malpliigon de 40% de la elsendoj de forcejefikaj gasoj, rilate al la jaro 1990, laŭ atestas la konkludoj de la Eŭropa Konsilio de 2014. Eĉ EU prezentis jam planojn por klimato kaj energio ĝis 2030.



Sed ni vidu la antaŭaĵojn de tiu agado en la sino de Eŭropa Unio:

Kompreneble, la originaj traktatoj, nome, la Eŭropa Komunumo pri Karbo kaj Ŝtalo (1951) kaj la traktato pri la Fondiĝo de Eŭropa Komunumo kaj tiu pri Atomenergio (1957), enhavis nenion pri medioprotektado, ĉar en tiu momento neniu zorgis pri tio. Sed en 1972 la Eŭropa Komunumo (EK) partoprenis la Konferencon pri la Homa Medio, en Stokholmo, kaj en oktobro de la sama jaro, en Parizo okazis la Pintkunsido de Ŝtatestroj kaj Registarestroj, havante de tiam novajn celojn pri medioprotektado. Tiel komenciĝis serio da Agadprogramoj pri Medio, la unua de la 22-a de novembro 1973, kun ĝeneralaj celoj, kaj kun la penso jam en la internacia kunlaboro. Sed, kompreneble, fakte, estis en la traktatoj neniu artikolo por protekti la medion, do, ili uzis la artikolojn plej proksimajn por tiu celo, kaj ĉefe la tiaman art. 235, kiu ebligis agi al la Komunumo, kiam estos necese plenumi difinitan celon, kvankam la traktato silentas.

Sekvis dua, tria kaj kvara Programoj, ĝis 1992, grava dato, ĉar la Traktato de Maastrichto kreis la Eŭropan Union kaj samtempe agnoskis kiel propran celon la “politikon pri Medioprotektado”. Jam estis vera komunuma politiko, ne ekskluziva, sed komuna kun la membroŝtatoj.

La 5-a Programo pri Medioprotektado estis aprobita la 15-an de decembro 1992, kaj celas ankaŭ la helpon al la neevoluintaj landoj. Tiu Programo havas tre interesan titolon, nome “*Politiko pri Medioprotektado kaj daŭropova evoluo, kiu respektos la medion*”, kaj ekmarŝis laŭ la tendencoj de la

Konferenco de UN pri Medio kaj Evoluo de Rio-de-Ĵaneĵro 1992. La termino “daŭropova evoluo”, naskiĝinta en Rio-de-Ĵaneĵro, estas ene de tiu programo kaj la sekvonta.

Poste la sesa Programo pri medioprotektado, titolita ĉifoje “*la estonto estas je niaj manoj*”, substrekas la bezonon agi je ĉiu nivelo: nacie, regione, kaj internacie. Ĝi memorigas la bezonon zorgi pri la klimato, la biodiverseco, la rilato inter medio kaj sano, kaj limigi la rubaĵojn. Fine, oni asertas ke la protektado de la medio integriĝos ene de la aliaj komunumaj politikoj.

La sekvantaj traktatoj de la Eŭropa Unio, nome, tiuj de Nico, Amsterdamo kaj la lasta de Lisbono, same aplikas tiujn celojn *sed nun* specife la problemo pri la tutmonda klimatsanĝo estas vera celo de la Unio.

La sepa Programo, titolita “*Vivi bone respektante la limojn de nia planedo*” laŭ Decido de la Parlamento kaj la Konsilio de la 20-a de novembro 2013 kun strategio ĝis 2020, proponas naŭ gravajn celojn por la Unio kaj por ĝiaj membroŝtatoj, en la kadro de la Pintkunsido “Rio+20” kiu reliefigas la tutmondan dimension de la protektado de la medio.

La unua kaj prioritata celo estas konservi la naturan heredaĵon de la Unio (teron, maran kaj ne-salajn akvojn, biodiversecon, arbaron ktp). La restantaj celoj klopodas mildigi la riskojn de la polucio rilate la sanon de la eŭropaj civitanoj, protekti la klimaton, certigi investojn tiucele kaj alfronti la tutmondan mediajn defiojn loke, regione kaj tutmonde.

Laste, la 8-a kaj 9-a celoj klopodas daŭripovecon en la urboj, kaj alfronti la klimatajn defiojn internacie.



Krom tiuj programoj, Eŭropa Unio por plenumi la Traktaton de Parizo pri la Klimato, fiksas “Agadkadron por la klimato kaj energio”.

Por teni la klimatsanĝon sub danĝeraj niveloj, la internacia komunumo konsentis per la Traktato de Parizo, ke la averaĝa temperaturo de la planedo ne devas superi 2° C. rilate al la temperaturo de la preindustria erao. Por tiu celo E.U. petas de siaj membroŝtatoj:

- Redukti la nocajn elsendojn .
- Kuraĝigi aliajn grandajn poluantojn adopti taŭgajn rimedojn.
- Kontroli la neeviteblajn efektojn de la klimatsanĝo.

Certe, se oni adoptas nun rimedojn por lukti kontraŭ la klimatsanĝo, oni ŝparos homajn kaj ekonomiajn kostojn

longatempe. La kreskanta deziro de puraj teknologioj malfermas eblecojn por modernigi la ekonomiojn de Eŭropo kaj krei ekologiajn kaj laborajn efikecojn.

Do, por 2020, la Unio fiksas jenan celon rilate la energion kaj klimatsanĝon:

- Unue redukti la forcejefikajn elsendojn en Eŭropo, 20% minimume koncerne al tiuj de 1990.
- Pliigi 20%-e la renovigeblajn energiojn en la tuta Eŭropo.
- Plibonigi la energian efikecon por redukti 20%-e la poluantajn energiojn.

Aliflanke, EU promesis pliigi tiun reduktadon de eksendoj de 20% ĝis 30% antaŭ la jaro 2020, se aliaj gravaj ekonomioj devontigas sin preni sur sin tiun globalan klopodon.

En oktobro 2014, la respondeculoj de *EU fiksas ankaŭ novajn defiojn por la klimato kaj energio por 2030*. Inter ili, ni kaptos la atenton pri:

- Redukti 40%-e minimume, rilate al la niveloj de 1990, la forcejefikajn elsendojn.
- Havi minimume 27%-on el renovigeblaj energioj.

Longatempe *EU antaŭvidas redukti la nocajn elsendojn antaŭ 2050*, inter 80% kaj 95% rilate al la nivelo de 1990, per efektivaj agadoj tiucele, de industriaj landoj.

En dokumento titolita “Al hipokarbona ekonomio por 2050”, Eŭropa Komisiono fiksas la plej efikan manieron por la plenumo de tuja reduktado de CO2 elsendoj.



Iom-post-iom la karbona ekonomio malaperos en Eŭropo

Avantaĝoj de tiu agadplano estas la garantio de atingebla energio por ĉiu konsumanto, plej sekura energia provizo, reduktado de energiaj importadoj kaj pli da dungiteco por la civitanoj. Krom tio, se ĉiuj reduktas la atmosferan poluadon, ĉio ĉi favoros la sanon de la loĝantaro.

Tamen, necesaj investoj estos grandaj por garantii tiun efikecon.

Sed kiel funkcias la Eŭropa Unio tiucele? Eŭropa Unio estas subjekto de Internacia Juro kaj havas la rajton subskribi traktatojn kaj aliĝi al ili. Kutime, EU, kiel antaŭe la Eŭropa Komunumo subskribas kaj aliĝas al jam ekzistantaj konvencioj

pri protektado de ĉiu difinita spaco. Tiam, tiuj subskribitaj konvencioj estas rekte aplikeblaj al la membroŝtatoj.

Tiu principo de superrego de la Eŭropunia kaj komunuma juro sur la membroŝtatoj estis ĉiam asertita de la Justica Kortumo de Eŭropa Unio.

Sed la membroŝtatoj devas apliki tiun leĝaron, kaj pro tio la Eŭropa Komunumo kaj nun la Eŭropa Unio uzas kutime Direktivojn. La eŭropunia derivita juro konsistas ĉefe el Reglamentej, Direktivoj kaj Decidoj. La Reglamenton oni uzas por ĝeneralaj celoj kaj por ĉiu lando de EU. Kompreneble Reglamento estas tro ampleksa por fiksi al iu difinita membroŝtato normojn kiam okazis poluado de la aero, de la maro aŭ alia problemo. Oni kutime uzas la Direktivojn, kiuj estas adresitaj al difinita ŝtato kiu devas plenumi la celon de la normo, uzante la rimedojn kiujn la ŝtato konsiderus plej efikaj. Do, estas normo por plenumi libermaniere la celon. Ne gravas kiu aŭtoritato plenumos ĝin, sed ĉiam devas esti rekte aplikata pro la superrego de la eŭropunia juro.

Malagrabra realaĵo

Kvankam S-ro Laurent Fabius, Direktoro de la Konferenco de Parizo kaj eksa Ministro pri Eksterlandaj Rilatoj de Francio asertis ke *“tiu ĉi ambicia plano estas historia decida punkto por redukti la varmigon de la terglobo”*, bedaŭrinde la realaĵo ne estas tiel optimisma. Gravaj industriaj ŝtatoj, forte poluantaj, ne ratifis la Traktaton kiel Usono, kvankam sia tiama

Ŝtatestretario, S-ro John Kerry subskribis ĝin, poste oni ne ratifis la tekston.

La 1-a de junio 2017, S-ro Donald Trump anoncis la retiriĝon de Usono de la Traktato de Parizo por ne damaĝi la industriajn kaj ekonomiajn interesojn de la lando.

Krom tio, studoj publikigitaj en la 2017 montras ke neniu el la industriaj landoj plenumas la anoncitajn politikojn pri reduktado de elsendoj de nocaj gasoj. Sekve, la sumo de tiuj elsendoj de la subskribintaj landoj ne estis sufiĉe por teni la mondan temperaturon malpli ol 2°C. Aliaj studoj publikigitaj en 2018 avertas sojlon kie la temperaturo povas plialtiĝi ĝis 4 aŭ 5 centigradoj, kompare al la preindustriaj niveloj, kio estos vera katastrofo por nia terglobo.

Antaŭ tiuj malgajaj prognozaj, Eŭropa Unio jam adoptis “Strategion por adaptado de EU”, kie oni konsilas redukti la karbo-minejojn, la energian konsumon en konstruaĵoj, industrioj kaj elektraj hejmitoj, neforgesante redukti la elsendojn de CO² en ĉiu nova aŭtomobilo. Oni konsilas ankaŭ ke ĉiu membroŝtato adoptu naciajn planojn por alfronti la neeviteblajn efektojn de la klimatsanĝo, de nun ĝis 2020. Kelkaj landoj jam eklaboras por adaptiĝi al tiuj ĉi strategioj.

Por adaptado al klimatsanĝo dum la venontaj jardekoj, tre grave estas modifi la normojn pri konstruado, ŝpari akvon, kontroli ŝirmilojn kontraŭ inundoj, zorgi la hejman hejtadon, kaj

evoluigi kultivadojn rezistantajn al severaj sekecoj ktp. Sed tio ĉi ne efektiviĝos sen peno kaj doloro, ĉefe en la karbominejajn regionojn el Eŭropo, kie preskaŭ la tuta loĝantaro vivas kaj laboras danke al tia industrio.

Konklude ni konstatis ke tra ĉiu internacia leĝo pri la medio, tre ofte ni estas antaŭ neforta juro, plena de konferencoj jure nedevigaj, de rekomendoj, eblecoj, sed malmultaj devigaj tekstoj, escepte de la internaciaj traktatoj kiel tiu de Parizo 2015 kaj la leĝaro de la Eŭropa Unio. Kaj ĉiam Eŭropa Unio protektas la klimaton kaj la biosferon, per sia leĝaro, esencaj esprimoj de la komuna heredaĵo de la homaro. Do ni havas gravan respondecon por la defendo de kolektivaj ekologiaj interesoj, kiujn oni devas gardi por la tuta homaro.

Ni esperos ke la proponoj ĉu de Unuiĝintaj Nacioj ĉu de Eŭropa Unio kaj ĉefe la respondoj de la ŝtatoj al tiu Traktato de Parizo pri la Klimatŝanĝo estu favoraj por la bono de la homaro.



ĜENERALA SKIZO DE LA *KAFALO*¹ KAJ ĜIA AKCEPTO EN LA OKCIDENTAJ JURAJ SISTEMOJ

✍ José María Rodríguez Hernández
Hispanio

La *kafalo* estas familia institucio propra de la islama juro kun religia deveno, kiu ne originas filajn rilatojn, tio estas ĝi ne estas esence adopto. Tamen, ĝi posedas karakterizaĵojn proprajn el adoptado ĉar la lasta celo de ĉi tiu institucio estas certigi la prizorgadon de la infano. Pere de *kafalo* homo, ĝenerale temas pri viro kiu ricevas la nomon *kafil*, prenas sur sin la zorgadon kaj respondecon de infano, nomita *makful*, tamen *kafil* nur garantias la subtenadon kaj edukadon de *makful*. Ĉi tiu ne ricevas la familian nomon de la prizorganto, same li havas neniun heredan rajton, kvankam ĉe kelkaj islamaj ŝtatoj ekzistas la tiel nomata “adopto per rekompenco”, pere de kiu *makful* ricevas heredaĵon el *makfil*.

En preskaŭ ĉiuj okcidentaj leĝaroj oni konsideras, ke la plej bona rimedo por protekti senzorgan infanojn estas integri ilin ene de nova familio, tio estas: la daŭra kaj kompleta adopto kiu kreas juran ligilon inter la adoptanto ka la adoptito, kaj samtempe

¹ *Kafalo* estas la esperantigo de la araba vorto الكفالة (al-kafāla). Pro la fakto, ke ĉi tiu vorto ne estas oficiala, ene de ĉi tiu artikolo ĝi aperas kursive.

nuligas tiun saman ligilon inter la ĵus adoptito kaj lia praa biologia familio. Male, en la plimulto el la leĝaroj de islamaj ŝtatoj adoptado estas tute malpermesita². Ĉi tiu malpermeso troviĝas sian kialon sur la propra Korano, versikloj 4 kaj 5 de la surao 33³. Tio estas akceptita leĝe ĉe multaj islamaj ŝtatoj, inter ili la artikolo 142 de la Familia Kodo de Maroko kaj 46 de sama leĝo en Alĝerio.

Konkrete en Maroko, la leĝo n-ro 15/2001 difinas la *kafalo* kiel la kompromiso preni bonvole sur sin la protektadon, edukadon kaj viv-tenadon de ne-zorgita infano, same kiel patro agus rilate sian filon. *Kafalo* povas esti akceptita antaŭ juĝisto aŭ antaŭ notario. Se antaŭ notario nepre la gepatroj de la infano devas esti identigiitaj kaj akcepti la starigon de la *kafalo*. Se antaŭ juĝisto oni devas deklari antaŭe, kaj kun la interveno de prokuroro, la malzorgon de la infano.

Kiel dirite, laŭ la maroka juro kaj normale en ĉiuj islamaj landoj, la *kafala* institucio ne atribuas heredajn rajtojn, ankaŭ ne konsideron kiel filon. Plenaĝulo kiu starigas *kafalon* rilate infanon devigas sin viv-teni, zorgi kaj protekti lin, ankaŭ eduki ĉe sana etoso ĝis kiam li atingos la plen-aĝan majoritaton, escepte se ekzistas handikapeco rilate la adoptiton⁴ kaj li ne kapablas garantii sian propran viv-tenon, tiel ĉi tiu jura institucio povas daŭriĝi post la atingo de la aĝa majoritato.

² Tamen kelkaj islamaj ŝtatoj akceptas ankaŭ la adoptadon, inter ili Tunizio laŭ leĝo de la 4-a de marto 1958.

³ Laŭ la Korano, la rilato patro-filo nur povas baziĝi sur biologiaj originoj.

⁴ La uzo de vortoj “adoptanto” kaj “adoptito” neniel signifas ke ambaŭ institucioj: adoptado / *kafalo* estas similaj.

Laŭ la maroka leĝo *kafalo* finiĝas ankaŭ kiam adoptanto aŭ adoptito forpasas; kiam adoptanto estas deklarita kiel nekapabla aŭ okaze de juĝo kiam oni konsideras, ke la adoptanto ne plenumas siajn devojn.

La leĝaro de tiuj islamaj ŝtatoj rilate la *kafalon* nepre postulas, ke la adoptanto estu islamano, ĉi tio estas komprenebla, pro la fakto ke unu el la bazaj celoj de la institucio estas certigi la edukadon de la adoptito ene de la islama religio. Rilate la naciecon de adoptanto kaj adoptito, kelkaj ŝtatoj ne admisias la tiel nomata internacian *kafalon*, ekzemple Irano, Maŭritano kaj Egipto, male aliaj ŝtatoj tion akceptas ekzemple Maroko kaj Pakistano, kaj en kelkaj ili ekzistas kaj *kafalo* kaj samtempe la adoptado, ekzemple en Indonezio kaj Tunizio.

Ĉu oni akceptas la efikon de ĉi tiu speciala familia ligo en ŝtatoj kie ghi ne ekzistas?

Kiel asertis juĝo de franca tribunalo en la jaro 2009. *kafalo* estas jura institucio kiu garantias la superan intereson de la infanoj, do oni povas diri, ke ĝi egalas al adoptado, kaj ni diru eĉ al familia akceptado. Ĉi tiu asimilo inter *kafalo* kaj adoptado/akceptado, oni devas studi laŭ 2 malsimilaj vidpunktoj:

- a) Se paroli pri aŭtomata asimilo inter la islama *kafalo* kaj la okcidenta adoptado oni devas rifuzi tion. Oni ne povas

atribui al ĉi tiu jura institucio efikojn kiuj ne ekzistas en la landoj kie ĝi kreiĝis. Tiel, la Eŭropa Tribunalo de Homaj

Rajtoj en la kazo *Chbihi Loudoudi* kaj aliaj kontraŭ Belgio, juĝis en la jaro 2014, ke la decido de Belgio ne admisii la adoptadon de marokano akceptita en ties familio pere de *kafalo* ne kontraŭas la artikolon 8an de la Eŭropa Konvencio de Homaj Rajtoj, ĉar origine la nacia leĝo de ambaŭ homoj ne atribuis adoptan efikon al *kafalo*. Do, en okcidento infano akceptita kiel *kafil*, aŭtomate ne povas esti konsidearta kiel adoptito, escepte kiam li estas senzorga kaj nur se la akceptanto/adoptanto estas oficiala institucio.

- b) Alia vidpunkto pri la ekzisto de *kafalaj* rilatoj en Okcidento estas la naskiĝo de kelkaj rajtoj de la adoptito rilate la adoptanton, ekzemple se paroli pri la pago de orf-pensio post la morto de adoptanto, afero agnoskita de kelkaj tribunaloj en Hispanio kaj Francio, aŭ pri la rajto alvenigi familianojn el islamaj ŝtatoj en okcidentajn landojn. Almenaŭ en Hispanio, tiu rajto estas akceptita se la *kafalo* okazis pro decido de juĝisto, laŭ ni jam vidis tio signifis, ke ekzistis antaŭe malzorgo de la infano. Tamen, oni ne agnoskas tiun rajton kaj do, oni ne akceptas la alvenon de adoptitoj, se la *kafalo* naskiĝis post privata konsento kun interveno de notario.

Tio ŝuldiĝas al la fakto, ke oni konstatis la ekzisto de ofta fraŭdo en la privata, antaŭ notario, konstituo de *kafalo* kiu nur celis la elmigradon de infanoj pro deziro de la gepatroj kaj sen realaj ligoj kun la adoptanto aŭ eĉ la malbona zorgado de la infano. Male, tiu ligo ja estas agnoskita se la *kafalo* okazis antaŭ Tribunalo, ĉar tiukaze la juĝisto

nepre devas konstati la nezorgon kaj la bezonojn de la infano.

Do, resume, ni povas diri, ke kvankam la *kalafa* institucio aŭtomate ne povas esti konsiderata kiel adoptado en okcidentaj landoj ja, povas naskigi kelkaj jurajn efikojn kiuj estas karakterizaĵoj de patro-filaj rilatoj.



NOVA REVUO EN ESPERANTO !

Temas pri *VENTO*, la revuo en la internacia lingvo kiu pritraktas veksilologiajn temojn (Veksilologio = Flagoscienco). Ĝi estas libere alirebla, vizitu la paĝon: www.esperanto.ac/vento.

VENTO aperas 4-foje en la jaro.



Justica Domo en Lahti (Finlando)



Mallongaj Juraj Informoj

§ Laŭ informo sciigita de meksika deputito, nuntempe ok mil meksikaj indiĝenoj estas enkarcerigitaj, malgraŭ la fakto, ke dum la juĝa proceso neniu tradukisto el ilia lingvo helpis lin por kompreni kaj esprimi sin antaŭ la tribunalo. Li ankaŭ petis al la ĝenerala prokuroro de la Respubliko garantii ke, okaze de arestoj de meksikaj indiĝenoj, ili devos deklari helpitaj de interpretistoj kiuj devas koni sian soci-kulturan etoson. Samtempe la Komitato de Indiĝenaj Popoloj proponis al la Nacia Komitato de Homaj Rajtoj en Meksikio ekigi kampanjon per radio kaj televido por informi al membroj de tiu komunumo pri iliaj rajtoj se ili estas arestitaj.



Rilate lingvojn, en Meksikio estas agnoskitaj 68 indiĝenaj lingvoj, tiel, preskaŭ unu miliono da enloĝantoj parolas ekskluzive unu el tiuj lingvoj kaj tute ne kapablas esprimi sin en la hispana lingvo. La deputito deklaris, ke se tiu arestito estas

indiĝeno la ĉeesto de tradukisto ne povas dependi el lia kono de la hispana lingvo, tiel se arestita indiĝeno oni devas garantii tuj ke li disponos pri tradukisto.

§ Hispana juĝisto konsideras, ke la rilato ekzistanta inter tiuj laboristoj konataj kiel *riders* (biciklantoj), do, tiuj kiuj havigas al klientoj petitajn varojn kaj ofte iras per biciklo en grandaj urboj, kaj la interreta kompanio *Deliveroo*, kiu kontaktigas la klientojn kun tiuj *riders*, estas labora rilato.



La labor-inspektoroj mon-punis la kompanion pro la fakto, ke oni ne deklaris tiun laboran rilaton kaj kompreneble oni pagis nenion kiel sociajn kvotojn pro la laboristoj dungitaj. Male, la kompanio asertis, ke tiuj *biciklistoj* estis aŭtonomaj laboristoj kiuj tute ne rilatas al la kompanio, kies sola respondeco estis kontaktigi ilin kun la klientoj kiuj petis varojn.

Laŭ la juĝo la certaj produktiloj de tiuj laboristoj ne estis la biciklo kaj la portebla telefono, male la laboristoj uzas la

interretan kompanion por akordi la peton de la kliento kaj la ofero de la laboristo. Tiuj klientoj unue devas enskribi sin en la interreta paĝo de la kompanio, sen tiu aliĝo estas tute ne-eble plenumi la varojn. Samtempe estas tute necese por tiuj *biciklistoj* aliĝi ankaŭ al tiu paĝo pere de la portebla telefono kaj sekvi la instrukciojn de la entrepreno por plenumi la peton.

Krome, la juĝo asertas, ke antaŭ kelkaj jaroj la entrepreno *Deliveroo* organizis intervjuojn kaj poste kursojn por tiuj *biciklistoj*, poste oni organizis renkontiĝojn kaj eĉ oni maldungis kelkajn laboristojn, do oni sekvis la saman metodon ol tipa entrepreno rilate siajn laboristojn.

Do, la juĝisto konsideris, ke oni devas deklari ilin kiel laboristojn de tiu entrepreno, kaj tiel ili povos ĝui sociajn kaj sanitarajn servojn kaj eĉ monhelpojn kaze de maldungo.

§ La Internacia Tribunalo sciigis la pasintan monaton februaron, sian opinion rilate la demandon prezentitan de la Ĝenerala Asembleo de UN en la jaro 2017, pri la situacio de la insularo *Chagos* post la sendependiĝo de Maŭricio, eks-brita kolonio.

Estas necese antaŭdiri ke la insularo *Chagos* estis parto de la brita kolonio Maŭricio en la Hinda Oceano. La kolonio

sendependiĝis en la jaro 1965, tamen 3 jarojn antaŭ ol tiu momento, Britio apartigis *Chagos* el la kolonio Mauricio kaj poste oni luis ĝin al Usono, por esti uzata kiel milit-bazo. Pro tio la koloniantoj forĵetis la tutan enloĝantaron al apudaj teritorioj.

La Tribunalo decidis per 13 poraj voĉdonoj kaj 1 kontraŭa, ke la disigo de *Chagos* ne estis jure valida kaj ĝi eĉ fariĝis kontraŭ-leĝan fakton pri kiu Britio, kiel kolonianto, estis respondeca. Do, oni ne povas konsideri, ke la malkoloniigo de Maŭricio estas tute kompleta, ĉar antaŭ ol tiu fakto la kolonianto forprenis parton de ĝia teritorio al nova sendependa ŝtato. Samtempe la Tribunalo petis al ŝtatoj kunlabori por finigi tiun procezon.



La Tribunalo nuligis la eblon organizi referendumojn en koloniataj teritorioj sen la partopreno de la Ĝenerala Asembleo de UN, pro la fakto ke la Malkoloniiga Komitato devas kontroli tiujn konsultojn. La Tribunalo denove elstaris la gravecon de la rezolucio 1514 (XV) de la Ĝenerala Asembleo, mejloŝtono de la malkoloniigo post la dua mondmilito, kiu proklamas, inter aliaj,

la principon pri teritoria integreco de la ŝtatoj okaze de malkoloniigaj procezoj. Oni memoris ankaŭ ke la libera memdetermino ne estas aplikebla kiam la enloĝantaro de la kolonio ne estas reale “popolo”, ĉi tiu afero ja estas gravega rilate aliajn malkoloniigaj procezojn kiel tiuj de la Malvina/Falklanda Insularo en Argentino kaj Ĝibraltaro en Hispanio.

Laŭ *Abdulqawi Ahmed Yusuf*, Prezidanto de la Internacia Tribunalo, la regado de la insularo fare de Britio estas daŭra kaj kontraŭ-leĝa akto. Siafoje, *Pravind Jugnauth*, premiero de Maŭricio, kvalifikis la rezolucion de la Internacia Tribunalo kiel “*historia momento por la maŭricia popolo, inkluzive tiu de la Chagos-insulo, elpelitaj el sia propra teritorio kaj kiuj ne rajtas reveni*”. Temas pri 4.000 homoj kiuj devis foriri al apuda insuloj Sejšeloj aŭ al britaj urboj.

En ĉi tiu afero alia ŝtato ĉefrolas, temas pri Usono kiu luis la insulon kiel militan bazon, kun la kondiĉo, ke ĝi devus esti senhoma. La luigo de la insulo Diego Garcia, ĉe la Chagos-insularo, daŭros ĝis la jaro 2036.

§ Jura Tribuno Internacia

Galerio de Elstaraj Esperantistaj Juristoj



MIGUEL SANCHO IZQUIERDO
Hispanio (1890 – 1988)

Katedratiisto pri Filozofio de la Juro en la Universitato de Zaragozo, kie li estis rektoro de 1941 ĝis 1954. Doktoro *honoris causa* en la Universitatoj de Navaro, Bordojo kaj Tuluzo. Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, li ĉeestis UK-ojn en Varsovio kaj Tokjo.



Verdikto

Plena Ilustrita Vortaro difinas VERDIKTO kiel:

1. Decido de juĝinstanco pri kulpeco de akuzito aŭ la praveco de la pretendoj en proceso.
2. Decido de juĝantaro pri konkurantoj.

Ni pristudu esence la unuan difinon, ĉar ĝi estas tiu kiu rilatas rekte al juro. Kvankam verdikto povas esti komprenata kiel juĝo, en la senco ke juĝo estas laŭleĝa esploro de ies kulpeco aŭ praveco kaj la decido, kiu sekvas tian esploron, vere verdikto devas esti komprenata kiel juĝo prononcita post profunda kaj aŭtoritata pripensado kaj specife, pri tiu decido kiu estas prenata de tribunalo, ne nur de unuopa juĝisto.

Kompreneble ankaŭ juĝoj de unusola juĝisto naskiĝas post pripensado, tamen verdikto posedas sencon rilatan al diskutado, akceptado kaj pripensado, kio estas komuna karakterizaĵo de la decidoj alprenataj ĉu de tribunalo, tio estas almenaŭ tri juĝistoj aŭ de ĵurio, aro da homoj ne-juĝistoj kiuj devas adopti decidon pri kulpeco aŭ malkulpeco de homo.

La verdikto okazas antaŭ la juĝo, tio estas, la ĵurio, la tribunalo aŭ eĉ la juĝisto devas prononci ĉu iu estas kulpa aŭ senkulpa kaj post tiu deklaro aperas la juĝo, tio estas la decido de

juĝisto aŭ tribunalo, neniam de ĵurio, pere de kiu iu estas kondamnita aŭ absolvita. La verdikto baziĝas sur motivaroj, tio estas aro de la motivoj de la juĝisto por adopti unu aŭ alian decidon, tio estas: verdikto. Post la verdikto, la juĝisto aplikas leĝon kaj li diskonigas juĝon, pere de kiu li estos kondamnita aŭ ne.

Tiel, verdikto reale ne baziĝas esence sur leĝo, malsimile al la juĝo kiu devas naskiĝi post la apliko de leĝo. Verdikto baziĝas sur motivoj konsiderataj kaj atente pristudataj de la juĝistoj aŭ de la ĵurio.

Ekzemple, ni vidu logikan procezon por kompreni la (malgrandan) diferencon inter verdikto kaj juĝo.

Antaŭ la tribunalo la partioj prezentas faktojn:

- Prokuroro asertas ke la akuzito pafis kontraŭ la viktimon kaj murdis lin.
- Defendanto asertas, ke la akuzito ne troviĝis tiuloke kiam ĉio okazis.

Ĉe la tribunalo ambaŭ partioj prezentas pruvojn kaj atestantoj deklaras. La tribunalo pristudas la aferon kaj ili konsideras, ke ekzistas pli gravaj motivoj por konsideri ke la akuzito efektive murdis la viktimon.

La tribunalo surbaze de tiu motivaro diskonigas verdikton, ke la akuzito estas kulpa, ili estas konviktaj ke la akuzito murdis la viktimon kaj neniu absoluta cirkonstanco ekzistis, por konsideri, ke li estas sen-kulpa, ekzemple li ne agadis sindefende.


Surbaze de tiu verdikto la juĝisto aŭ la tribunalo aplikas leĝon kaj li aŭ ili kondmanas la akuziton resti en malliberejo dum 25 jaroj.

En tiuj ŝtatoj kie ekzistas ĵurio la verdikto povas esti eldirita de ĵurio, ne de profesia juĝisto aŭ tribunalo. Do, en multaj ŝtatoj la verdikto povas esti alprenata de profesia juristo aŭ de ne-profesia ĵurio. Juĝo ĉiam devos esti adoptita de profesia juristo aŭ juristoj (tribunalo).

Last-momenta Informo

La Ĝenerala Asembleo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio, kadre de la Universala Kongreso de Esperanto de Lahti (Finlando), okazos en la salono KONISI, ĵaŭde la 25-an de julio 2019, je la 12:45 horoj.

El nia Gazetoteko



Aperis sur la numero 20
(1979) de *Internacia Jura
Revuo*.

La Jurpunaj Ideoj de Aristotelo

***Prof. D-ro S. ANAGNOSTAKIS
(Universitato de Saloniko)***

Granda datreveno estis celebrita dum la pasinta jaro* en Grekio kaj en kelkaj aliaj landoj. Temas pri la "Jaro de Aristotelo", de tiu alta menso, kiu prilumis la mondon antaŭ 2000 jaroj kaj kiu efikis eĉ je la historio mem de la homaro. La influo de Aristotelo esta daŭra, malgraŭ ĉiuj ŝanĝiĝoj de la vivo-formoj.

La filozofo naskiĝis en Stagiĝo de la Helena Macedonio en la j. 384 kaj mortis en Halkido de la insulo Evia en la j. 323 a.K. Aristotelo estis longe miskomprenata. Estis diritaj kontraŭ li, tiel pri lia personeco kiel ankaŭ pri lia instruado, la plej

* Not. de la redaktoro: ĉi tiu artikolo aperis en la revuo *Internacia Jura Revuo* en la jaro 1979.

neimageblaj kaj malĝojigaj riproĉoj. Estis ankaŭ miskomprenataj liaj sociologiaj pensoj, ĉar li okupiĝis pri la tiama diferencigo de la homoj je liberuloj kaj sklavoĵoj. Sed la tempopaso forigis ĉiujn tiujn intencajn kaj surprizajn riproĉojn.

Estis pruvite politikaj kialoj de tiu epoko (ĉefe la malamikeco inter la du tiamaj grandaj regionoj de Grekio, nome de la Atena Demokratio kaj de la Macedona Regno), aŭ la miskompreno de la historia neceso-realo, kontribuis al troigaj riproĉoj de la verko, kiun li postlasis.

Aristotelo, krom la Filozofio pri kiu li okupiĝis (t.e., laŭ la tiamaj konceptoj, Logiko, Etiko, Metafiziko kaj Psikologio), disvolvis originalajn teoriojn ankaŭ en la branĉoj de Fiziko, Biologio, ktp. En la politika sektoro Aristotelo, inter la aliaj, kiel la unua sugestis la eblajn formojn de reĝimo de iu lando; nome la Reĝecon ("Vasilia") kun ĝia degenero al Tiranio, la Aristokration kun ĝia degenero al Oligarkio, la Demokration kun ĝia degenero al Anarkio. La prefero de Aristotelo inklinis -preskaŭ kiel tiu de lia majstro Platono- al iu milda formo de Demokratio. Pli speciale, en la scienca branĉo pri kiu mi okupiĝas (kriminologio kaj punpolitiko), Aristotelo disvolvis jurpunan teorion tre interesan, kiu estas tre proksima al la interna ideo - aŭ humaneca internaciismo laŭ la difino de

Prof. Lapenna-, kiu estas videbla tra la tuta klopodo direktita al la disvastigo de la Zamenhofa lingvo.

La historio de la homaro trakuris ĝis nun tri stadiojn en la branĉo de aljuĝado de punsankcioj: de la individua venĝo, de la privata justico kaj de la ŝtata justico.



La unuan stadion karakterizas la senmezura, instinkta venĝemo de la ofendita individuo (kiun apogas lia klano kun sia estro) kontraŭ la maljustinto (oni tion vidas eĉ hodiaŭ en kelkaj neprogresintaj triboj kaj ankaŭ ĝin rolas en kelkaj proverboj pri venĝemo).

En la dua stadio forlasiĝas la arbitreco kaj la kruda apliko de la forto, jam enŝoviĝas reguloj en la punprocezo kaj formiĝas elementa juĝa organizaĵo; tamen, tiu ĉi

“justico” plu havas privatan karakteron tiel ke la instiganto por ĝia plenumo kaj, multfoje, la efektiviganto estas la suferinto mem aŭ liaj familianoj.

Ĉi tie ekaperas ankaŭ la konata *jus talonis* aŭ rajto je samsufereco (Levitiko de Malnova Testamento 24,1; Korano XI, 173,ktp).

Tiu lasta jurapliko kondukis, malgraŭ ĝia ekiro, t.e. la bremsado de troigoj de la antaŭa stadio, al aplikoj senlogikaj, tiel ke prave Plutarko skribis: “Nur unu puno estis fiksita (eĉ ĝis la epoko de Solono, en la 6-a j.c. a.K.) por ĉiuj krimuloj la mortpuno, tiel ke la ŝtelistoj de legomoj aŭ fruktoj estis punataj egale kiel sakrilegiuloj aŭ mortigintoj”. Ĉie regas la principo de punado nur de la ago (*Tatprinzip*), dum la personeco de la aginto de kiu ajn krima ago ignoriĝas sisteme. Kaj tio etendiĝas komence, ankaŭ al la tria stadio, tiu de la ŝtata justico.

Eliras el la kadro de tiu ĉi artikolo la priskribo de la senlogikaj, abomenaj, malmoralaj (multfoje) aŭ eĉ perversaj punoj de tiu epoko, kun paralelaj manieroj de turmentado de la kulpuloj aŭ eĉ de simplaj suspektitoj (aferoj kiuj tiam interinfluadis). Estus paradoksaĵo se iu kuraĝus nomi tion edukado de la kondamnitaj, kiel mi priskribas en ĵus aperinta mia verko.

Aristotelo do, vivis ĝuste en la periodo de senfina homopersekutado, en kiu plu validis la principo de la samsuferado kiel puno. Ĝi manifestiĝis en la mortpuno kaj ekzekuto de Sokrato, la persekuto de la unua kosmografo Anaksagoro kaj la denunciado de Aristotelo mem pro malpieco, en la fino de lia vivo, fare de la religia ĉefo Eŭrimedono, kiu devigis lin elpatriiĝi.

Malgraŭ ĉio ĉi, Aristotelo, ekirinte de la Sokrata -kaj, ĉefe Platona-filozofio, esprimis la opinion ke oni devas atenti al la personeco de krimintaj homoj kaj ke la puno devas ne esti simpla, ni diru matematika, redonado de la faritaĵo de la aginto, sed devas havi elementojn tiel de la *kolasis*, t.e. la plibonigo, de la reedukado de la maljustaginto, kiel ankaŭ de la *timoria* (suferigo), por la kontentigo de la suferinto. "Estas diferenco inter *kolasis*, kiu aplikiĝas favore al la punito (tiel ke li pliboniĝu), kaj *timoria*,



Platono kaj Aristotelo, laŭ la itala Pentristo Rafaello Sanzio (1509).


kiu aplikiĝas pro la viktimo (kontraŭ la punito), por ke li restariĝu el la domaĝo kiun li suferis" (Retoriko, Arist.). "Al la malico nur apartenas la troecoj, kiel ankaŭ la (intencaj) mankigoj" (Et. Nikom.).

Enirinte, tiel, en la personecon de la aginto por aplikado en la supre menciita principo, Aristotelo pluiras al la distingo de la farita ago inter laŭvola kaj senvola: "La distingo je laŭvola kaj senvola estas necesa por tiuj kiuj okupiĝas pri virto; ankaŭ utila por leĝdonantoj" (Et. Nikom.).

La reflektiĝo de tiu ĉi lasta vidpunkto estas evidenta en la Romia Juro de la klasika epoko, en la prilaborado de la sencoj de *dolus* (dolo) kaj neglekto, kiel ankaŭ de kazoj pri liberigo el ĉiu respondeco. Tiel, Markianus klare diras, ke iu krimas ĉu intence (dole), ĉu pro pasio, ĉu pro hazarda cirkonstanco ("*Delinquitur autem aut proposito aut impetu aut casu*". Dig. 48,1,9.11.§ 1).

La konceptoj de Aristotelo pri la celo de la plunapliko eĥis en multaj pensoj kaj vidpunktoj de la grandaj Romiaj jurmajstroj de la klasika epoko. Tiel, Paulus akcentas, ke la puno dekretiĝas por la plibonigo de la homoj ("*Quod poena constituerit in emendationem hominum*" Dig. 48, II, 20).

La voĉo de Aristotelo estis silentigita dum la dekadenco de la Romia ŝtato kaj la sekvinta Mezepoko en Okcidento, kiam oni retroiris ĝis la punto punadi -samnivele- eĉ frenezulojn, konsiderante kulpo eĉ la frenezecon, aŭ fari ordinarajn procesojn kontraŭ bestoj aŭ objektoj (tegoloj, brikoj k.a.), kiuj kaŭzis la morton aŭ gravan korpan difekton al homo. (Vidu noton je la fino de la artikolo.)



Same, liaj ideoj ne trovis eĥon en Bizanco, kiu en sia senmezura despotismo ne konis aliajn punojn krom la senkapigoj aŭ la diversaj detranĉoj (mantranĉoj, langotranĉoj, naztranĉoj, tri manieroj de blindigo k.a.), por ne paroli pri la enkarcerigo de la kondamnitoj.

Aristotelo estis ignorata de la konkerintoj de la Bizanca ŝtato, kiuj, kun

Konstantinoplo kiel elirbazo, penetris en Eŭropon kaj lasis terurajn spurojn en la sektoro de la punaljuĝado, aparte kontraŭ la instigantoj kaj la ĉefoj de la popolaj ribeloj. Estas konataj la abomenaj manieroj de mortigo kaj pereigo de la "ŝtelistoj" (*kleftes*) en la greka regiono, ĝis la "hajdukoj" de la jugoslavia regiono kaj aliaj ribeluloj en la balkanaj landoj.

Tamen la spirito de Aristotelo ne estingiĝis. Tion montras ankaŭ la influo kiun havis lia filozofio eĉ je la Araboj dum la periodo de la kulmino de la Araba ŝtato. (Estas konataj la "promenantaj" Arabaj filozofoj Al Kidi, Al Farabi, Ibn Sina kaj la fratoj Al Safaa). Per la ekhumanigo de la punoj, esence de la epoko de Beccaria (1764), de la francaj enciklopedistoj kaj de Howard (1777), komencis denove revekigi la konceptoj pri kombinado de la plibonigo (*kolasis*) kaj suferigo en la punapliko. Per la apero, precipe, de la malliberigo kiel memstara puno (ĉefe ekde la j. 1555) la adaptiĝo ŝajnis pli favora kaj efektivebla. Malgraŭ la provizora regreso de ĉi tiuj novaj konceptoj, por ilia ombriĝo dum la 19-a jarcento fare de la tiel nomataj "klasikaj" jurpunaj konsciencoj je la fino de la sama jarcento -progreso, kiu fundamentigis, inter alie, la t.n. "Pozitivan Skolon" (de Lombros, Ferri, Liszt, Garofalo k.a.)- la direktiĝo por la ekzameno de la personeco de la kriminta

individuo lokiĝis en la unuan vicon de la kriminaljura scienco.

La ĉefa punkto de intereso de la punspecialisto ĉesas jam esti la t.n. "morala respondeco" de la perpetrinto, kiu baziĝas sur la akcepto de la dubinda libereco de la volo, kaj anstataŭe centriĝas al la ekzamenado de lia tuta personeco (psikologie, biologie, morfologie, socie, k.a.), kun la celo trovi la plej profundajn kialojn de la krima ago kaj taŭgan (individuigitan) sankcion (punon aŭ "rimedojn de sekureco"), tiel ke sekvu lia humaneca, prudentiga traktado, anstataŭ la "bonaspekta enkateno", por kiu pledis la lastaj el la klasikaj punologoj (en Grekio la neforgesebla Tzortozopulos).

Nun -kaj espereble ankaŭ estontece- estas akceptite en ĉiuj civilizitaj landoj (almenaŭ kun demokratiaj reĝimoj) ke la punado de la kriminto kiel abstrakta estulo estas restaĵo de anakronismo. Se ni vere deziras bremsi la krimecon, kiu atingis grandajn dimensiojn en nia epoko -kun sensaciaj suprenlevigaj tendencoj-, ĉiu "devojiĝanta" individuo devas esti multflanke ekzamenata, nome devas esti ankaŭ ĉi tie aplikata la "klinika" ekzamenado, por ke estu finkombinitaj la Aristotela *kolasis* kun la *timoria* (suferiga) elementoj

Noto (redaktita de advokato magistro s-ro K. Zaňarakis):

La famekonataj leĝinstruistoj de la 15-a kaj 16-a jarcentoj opiniis ke estas tute nature juĝi kaj kondmani bestojn. Jean Duré, advokato en la urbo Moulins skribis en la jaro 1573: "Se la bestoj ne nur vundas, sed ankaŭ mortigas aŭ formanĝas, decas al ili la morto kaj ili estu kondamnitaj al pendigo aŭ strangoligo". Barthélemy de Chassané en sia verko "Consilium", jese respondas en la jaro 1550, al la demando: "Ĉu la bestoj povas konfronti la Justicon?".

La juĝa enketo estis ĉiam tre subtila. La hommortiginta besto estis arestata kaj submetata je enketado. Ĉar ĝi, kompreneble, ne povis respondi, oni turmentadis ĝin; ĝiaj ĝemoj estis konsiderataj kiel konfeso de la kulpo kaj la puno al morto estis plenumata de la ekzekutisto.

La plej malnova proceso kontraŭ besto, pri kiu ekzistas dokumentoj, okazis en 1266 en Fontenay-aux-Roses apud Parizo. Juna porko estis kondamnita al morto per pendigo, ĉar ĝi formanĝis bebon. Estu notinde ke, antaŭ la ekzekuto, oni laŭtleĝis la decidon al la ---kondamnito.

La lasta proceso kontraŭ besto okazis en Francio dum Terurregado, ĉe la revolucia

juĝejo La 17-an de Novembro 1793, iu kriplulo estis kondamnita al morto kune kun sia hundo, kiun lastan li ekzercis tiel ke ĝi boju ĉiam, kiam ĝi vidas nacigardiston en blua uniformo. La protokoloj de la proceso, konservitaj en la Naciaj Arkivoj de Francio, raportas ke hundo estis mortigita en ĉeesto de ---Polica Inspektoro.

Tamen, krom la procesoj kontraŭ kvarpieduloj, oftaj estis procesoj tiel kontraŭ rampuloj (serpentoj) kiel kontraŭ insektoj; ekzistas multaj decidoj, ĉefe de ekleziaj juĝejoj, kiuj foje ilin kondamnas, foje ilin senkulpigas kaj foje, por ne absolute humiligi la ---respektindajn aŭtoritatojn, ili lerte prokrastis la findecidon de la afero.



Juro kaj Kino



Twelve Angry Men

(Dek du koleremaj homoj), 1957.

Reĝisorita de Sidney Lumet.

Roluloj: Henry Fonda, Lee J. Cobb, Jack Klugman, E.G. Marshall, Jack Warden.

Metro Goldwyn Mayer.

DEK DU KOLEREMAJ HOMOJ

Dek du koleremaj homoj estas unu el tiuj filmoj, kiu devus esti devige spektata ĉe fakultatoj kaj lernejoj pri Juro en la tuta mondo. Ĝi naskiĝis kiel teatro-verko kaj kune kun alia filmo *Tramo nomita deziro*, ĝi estas la plej altkvalita teatro-verko adaptita por filma ekrano. La originalan verkon verkis Reginald Rose, kiu ankaŭ adaptis la skripton por esti filme registrita. Sidney Lumet, la direktoro, kreis ĉi tiun majstro-verkon de tiuj filmoj kiuj pritraktas jurajn temojn.

La scenaro prezentas al ni juĝisto kiu metas finan punkton al jura proceso kontraŭ 18-jara junulo, akuzita pro la murdo de lia patro. La juĝisto petas al la 12 membroj de la ĵurio debati ĉu la junulo estas kulpa aŭ sen-kulpa. Se la ĵurio konsideras, ke la junulo murdis sian patron, la kondamno estus morti ĉe la elektra seĝo. La direktoro de la filmo aperigas tiumomente la vizaĝon de la akuzito, kiam la ĵurianoj iras en la ĉambron por debati, tiel la junulo ne estas anonima kaj ne-konata homo.



La 12 membroj de la ĵurio estas la solaj roluloj en la filmo

En tiu ĉambro disvolviĝas la tuta filmo, verdire temas pri teatro-verko pro la manko da sinsekvaj scenejoj. La skripto sciigas pri facila jura proceso, verŝajne ĉiuj pruvoj kaj ĉies opinioj montras, ke la junulo estas kulpa, do, la debatoj de la ĵurianoj devus esti rapidaj kaj la verdikto estos simpla: la junulo estas kulpa.

Tamen, unu el la ĵurianoj, tiu nomumita per la numero 8, opinias kaj ekargumentas, ke la junulo estas senkulpa, interkrampe ni diru, ke neniŭ nomo estas prononcata dum la debatoj kaj tiel, ĉiuj membroj de la ĵurio estas alparolataj per numero: *unu, du, tri...* ĝis la ĵuriano *dek du*.

Do, la ĵuriano 8, ludata de la grandega Henry Fonda post la unua voĉdonado (11 voĉdonoj poraj kaj 1 kontraŭ kulpa verdikto), opinias, ke li havas grandajn dubojn rilate la eblan kulpecon de la junulo. Verŝajne li ne kredas absolute, ke li estas senkulpa, li nur deziras ekigi debaton pri tiu ebla ne-kulpeco, pro la fakto, ke la vivo de junulo troviĝas je la manoj de la ĵurianoj, ni memoru, ke kulpa verdikto aŭtomate signifus la mort-kondamnon de la akuzito.



Henry Fonda en “12 koleremaj homoj”

Komenciĝas tiam debato pri la tiel nomataj “praveco de la pruvitaj faktoj”. Oni esprimas tiumomente opiniojn pri aferoj tute ne-menciataj en usonaj filmoj de la 5-a jardeko de la pasinta

jarcento, kiel la kruelaj traktadoj al junuloj fare de patro, la ofta perfortado en suburboj, ktp.

La ceteraj ĵurianoj deziras finigi baldaŭ la debaton pere de facila kulpa verdikto, tiel, longa debatado malebligus spekti sportmatĉon baldaŭ okazonta. Tamen, Henry Fonda, la ĵuriano n-ro 8, vidigas alian rigardadon de la faktoj okazintaj. Li aperigas dubojn rilate la deklaroj de la atestantoj, pri la armilo mem. Tiel, post kelkaj minutoj la streso pligrandiĝas, tion oni vidas pere de la cigar-fumo kaj la ĉemizoj trempitaj en ŝvito. La estos estas sufokiga, eĉ la ventolilo paneis.

Sidney Lument, la direktoro de la filmo, realigas imponan laboron. La filmitaj planoj estas mirindaj kaj la direktoro lokigas ĉiujn rolulojn kiel pecojn ĉe ŝaka ludo-tablo. Henry Fonda eĉ asertas: *“temas pri okazintaĵoj kies verecon ni neniam konos detale, do ni devas esti kuraĝaj adopti unu aŭ alian verdikton, sed stereotipoj, dogmoj kaj eksteraj influoj devus resti fore de la debato-ĉambro”*. Hodiaŭ, kelkaj jar-dekoj post la filmo, oni povas diri, ke efektiviĝi justicon sen tiuj eksteraj faktoroj estas iomete malfacila, verŝajne malebla por la homoj.

Krom ĉi tiuj juraj temoj, “12 koleremaj homoj” eble estas unu el la plej altvaloraj filmoj por tiuj kiuj studas la homajn kondutojn. Tio videblas kiam ĵuriano, fakulo pri merkatico, parolas pri kiamaniere vendi sukcese varojn. Ŝajnas, ke konviki unu aliajn pri la kulpeco de homo, aŭ pri la sen-kulpeco, ankaŭ povas esti merkatica varo. Similas al nuntempa situacio, kiam por enirigi kaj sukcesigi ideon en socion, estas necese kontakti unue kun prem-grupo, kiu helpas diskonigi kaj bone famigi tiun aferon.

Sendube “12 koleremaj homoj” estas mirinda filmo, tre bone rakontita kaj kun bonegaj aktoroj, kiuj faciligas la komprenadon de ĉies opinioj. Sidney Lumet kaj Reginald Rose eĉ proponas al spektanto esti plia ĵuriano. Ankaŭ ni, spektantoj, eniris en la ĉambron kun la tutcerta opinio, ke la junulo estis kulpa kaj iom-post-iom ni ŝanĝas nian juĝon kiam Henry Fonda montras pliajn novajn dubojn pri la kredebleco de la atestantoj. Do, ankaŭ ni povas esti facile manipulebla kiam aperas persvada, konvikema kaj karismo homo.

Ni komprenas, post la spektado de la filmo, ke kiu ajn krimulo povus ricevi sen-kulpan verdikton, se oni dubas aŭtomate pri ĉiuj pruvoj, pri ĉiuj atestantoj. Verŝajne la sola solvo estus esprimi konfesion pri mem-kulpeco fare de la krimulo, tamen tio estas nebla en ĉiuj fi-agadoj. Se tiel, ĉiuj krimoj kie povas aperi seriozajn dubojn restus sen-punaj, pro la antikva leĝo *in dubeo pro reo* (“se aperas duboj, por la akuzito sen-kulpan verdikton).

La fina mesaĝo de la filmo estas, ke neniu vereco estas absoluta kaj ni ĉiam povas esti konvikitaj de kontraŭa ideo, se aperas persvada homo.

Utilaj Notoj dum la Kunveno de IJEA

Lahti 2019



Eldonita en la urbo CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio) julio 2019.

Prezentita en LAHTI (Finnlando), okaze de la 104-a Universala
Kongreso de Esperanto, 20-a / 27-a julio 2019.